

FRANCA

PRIEURE SAINT - MARTIN
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns 76000 ROUEN
Sekr: F-ino A.M. CHANEY 56, rue Corvisart 75013 PARIS
Kasisto: S-ro G. VILLENEUVE 14, rue du Clair de Lune 91530 SAINT-CHERON
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59800 LILLE
Peranto IKUE: S-ro M. COLLEU 95, rue Victor Hugo 80440 BOVES

C.C.P.: Association Catholique Française pour l'Espéranto 2 324 93 N ROUEN.

==== la n^o: 8 F. Abono: 30 F. Kotizo: 10 F. Sumo: 40 F. ====

XX

==== N^o 189 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====

*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== JUNIO 1996 ====

XX

N.B. La materialon por la bulteno ni sendu al S-ro BASSO, 9, rue P. Doumer
68920 WINTZENHEIM, nepre antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto
kaj novembro.

XX

LE MOT DU PRESIDENT

Le bulletin de juin est le dernier que vous recevez sous sa forme habituelle. A partir du mois de septembre, notre bulletin changera de format et de présentation. Composé à l' aide d' un ordinateur, il sera à la fois plus moderne et plus lisible. Nul doute qu' il aidera notre association à progresser.

Mes remerciements et les vôtres aussi - j' en suis convaincu - vont à Mme Vincent qui fut notre fidèle et compétente rédactrice et aussi à son successeur M. Michel Basso, qui a accepté avec gentillesse et dévouement de devenir son remplaçant.

Avec un Comité Directeur renouvelé et un bulletin rénové, notre association devrait prendre, avec l' aide de tous ses membres, un nouvel essor. En attendant de venir nombreux, l' an prochain, à notre congrès de La Houssaye-en-Brie, il convient que nous persévérions dans l' étude et la pratique de la Langue Internationale, afin de propager l' amitié entre les peuples et de réaliser entre chrétiens l' Unité de la Foi. Si vous ne pouvez participer aux différents congrès et rencontres organisés cet été, je vous invite à faire l' effort de lire un ou plusieurs livres en Esperanto afin d' enrichir votre esprit et vos connaissances.

En attendant la rentrée de septembre, à tous je souhaite de joyeuses et agréables vacances.

A. B.

LA BILETO DE LA PREZIDANTO

La junia bulteno estas la lasta, kiun vi ricevas sub ĝia kutima aspekto. Ekde la monato septembro, nia bulteno havos novan firmaton kaj novan prezentadon. Kunmetita pere de komputilo, ĝi estos samtempe pli moderna kaj pli facile legebla. Certe ĝi helpos al la progreso de nia asocio.

Miaj dankoj kaj ankaŭ la viaj - pri tio mi ne dubas - iras al S-ino Vincent, kiu estis nia fidela kaj kompetenta redaktorino, kaj ankaŭ al ŝia posteulo, S-ro Michel Basso, kiu afable kaj sindone akceptis iĝi ŝia anstataŭanto.

Kun renovigitaj estraro kaj bulteno, nia asocio devus, kun la helpo de ĉiuj membroj, denove progresi. Atendante multopan partoprenon en nia venontjara kongreso en La Houssaye-en-Brie, ni daŭre studu kaj praktiku la Internacian Lingvon, por disvastigi amikecon inter la popoloj kaj efektivigi inter kristanoj la Unuecon en la Kredo. Se vi ne povos partopreni en la diversaj venontsomeraĵ kongresoj kaj renkontoj, mi invitas vin legi unu aŭ plurajn Esperanto-librojn por plinigi vian spiriton kaj viajn sciojn.

Atendante la septembran rekomendon, mi deziras al ĉiuj gajan kaj agrablan libertempon.

A. B.

PROTOKOLO DE LA KUNVENOJ EN PARIS

I. GENERALA KUNVENO la 4-an de majo 1996

Prezidas S-ro Bessière, kiu legas la salutleteron de S-ino Vincent.

S-ro Texier reprezentas U.F.E., S-ro Degoul Asisti.

F-ino Preux kaj S-ro Degoul donas la rezultojn de la balotado.

Agadraporto: 40 aproboj

Financa raporto: 39 aproboj, 1 sindeteno

Renovigo de 1/3 de la komitato:

Voĉdonis 40, sed nur 39 validas.

F-ino A.M. Chaney 39 voĉoj

S-ino Lafargue 39 voĉoj

S-ro Lafargue 39 voĉoj

F-ino Michel 39 voĉoj

Ĉiuj estas elektitaj.

F-to Marmou informas pri la venontjara kongreso en La Houssaye-en-Brie; ĝi okazos de la 23-a ĝis la 27-a de majo 1997. La detala programo aperos sur la decembra bulteno.

S-ro Basso, nova redaktoro de nia bulteno, ne povis ĉeesti, sed li sendis provnumeron, kiun ĉiuj aprobis.

La prezidanto informas pri la agado de I.K.U.E. En 1997 okazos kongreso en Italio (Rimini kaj Romo). En 1998 oni proponas akumenan kongreson en Francio, okaze de la 400-a datreveno de la edikto de Nantes.

II. KOMITATKUNVENO la 4-an de majo 1996

Ĉeestis: P-ro Bourdon, F-to Marmou, S-ino Lafargue, F-inoj Chaney kaj Michel, S-roj Bessière, Collet, Lafargue, Pons kaj Villeneuve.

Petis senkulpigon: S-roj Colas kaj Despiney.

Konsisto de la nova ee komitato:

Honarprezidanto: S-ro Colas

Kasisto: S-ro Villeneuve

Prezidanto: S-ro Bessière

Helpkasisto: S-ro Collet

Vicprezidantoj: S-roj Lafargue kaj Pons

Religia konsilanto: P-ro Bourdon

Sekretariino: F-ino A.M. Chaney

Membroj: F-to Marmou, S-ro Despiney,

Helpsekretariino: F-ino Michel

S-ino Lafargue

La komitato decidis transloki la asocian sidejon ĉe F-ino A.M. Chaney 56, rue Corvisart 75013 PARIS. Samtempe ĝi donas al S-ro Bessièrre, prezidanto, S-ro Villeneuve, kasisto, S-ro Collet, helpkasisto, kaj al F-ino Chaney, sekretarino, permeson subskribi la paŝtĉekajn kaj agi en la ŝparkaso.

S-ro Pons donas klarigojn pri la eldono "en Esperanta de la libro "Dio parolas al siaj infanoj". Post vigla diskuto, la komitato decidis eldoni la libron, kunlabore kun A.E.D. (Helpo al endanĝera eklezio). S-ro Pons prizorgos la tutan aferon.

La venonta komitatkunveno okazos en Paris la 13-an de oktobro 1996.

~~~~~

PREĜO

Simjoro, vi estas funde de mia koro,  
Vi flustras, ke vi amas min,  
kaj mi ne scias vin aŭskulti.  
Vi estas la Bona Paŝtisto.  
Sur viaj ŝultroj, vi portas miajn pekojn...  
mi voku vin,  
ĉar vi apudas tiujn,  
kiuj vere alvokas vin.  
Mi estas via infano, eta infano.  
Malgraŭ la pezo de la jaroj,  
mi kuras al vi kaj etendas la brakojn.  
Vi estas la savanta Dio.

Antoine de La Panouse

~~~~~

LA KASISTO KOMUNIKAS ...

Nova ano 1996: 4. S-ro JACOB (Cher). Bonvenon al la novulo.

Donacis monon: B-ro POUPLIN (D-Sèvres), F-ino VILLANOVA (B-du-Rhône), F-inoj CHANEY (Paris), S-ro CORNUT (Gard) kaj S-ro ANGEVIN (Sarthe).
Dankegon al ili pro ilia grava helpo al nia asocio.

Forgesemuloj, bonvolu sendi monon al F.K.E.A. por pagi vian kotizon 1996.
TUJ FARU! L.J. (07); H.T. (51); L.C.R. (56); C.L. (69); V.G. (59); V. (42);
G.O. (60); S.A. (66); A.A. (03); B.J.M. (51); G.R. (87); R.R. (14);
B.D. (37); R.C. (47); G.V. (09); P.M. (10); P.P. (76); M.S. (41);
F.A. (49); L.A. (91); M.G. (83); B.S. (46); F.P. (58); L. (37); A.A.M. (35); D.A. (Paris); P.R. (33); R.C. (42); L.J. (39); S.E. (80); C.P. (86); B.F. (44); B.G. (17); L.B. (94).

Koran dankegon al ĉiuj.

~~~~~

LA DIA JUĜO

Dum unu horo supreniradinte ni atingis la supron. Profunde mi enspiris kaj haltis; ĉirkaŭrigardante mi vidis la nigritajn murestatojn de kapelo. Arbetoj jam kreskis sur ili batalante kontraŭ diversaj truĝerboj. "Ĉu eble spuroj de milito?" mi demandis la maljunan kamparanon, kiu akompanis min tra la monto al Pösting. Li skuis la kapon. "Spuroj de Dio", li diris. .../...

Ĉi tiu rimarko de ja serinza, sed kiel ŝajnis al mi praktike sentanta viro, trafis min neatendite. Dum la suprenirado, li parolis al mi nur pri sterkaĵoj kaj lignokastoj. "Alie mi ne povas diri tion"; li daŭrigis: "La okazintaĵoj ĉe la kapelo estis tiel mirigaj, ke tiam unuanime ni decidis ne rekonstrui ĝin, sed lasi ĝin stari".

Poste li rakontis: "Tio okazis kelkajn jarojn antaŭ la milito. Post renkontiĝo en Pösting, sep kampanoj, klubanoj el mia hejmvilaĝo, iris hejmen malfrue en la vespero. Antaŭ al ili atingis la supron, ŝtorma fulmotondro ekfuriozis. Tial restis al ili nur rifuĝi en la malnovan, etan kapelon. Intertempe, la ŝtormo me malfortiĝis. Fulmo sekvis fulmon kaj tondrobato tondrobato. Eĉ la pluvo, ĉiam pli frapante sur la likantan tegmenton, ne malfortigis la potencon de la tondra ŝtormo. Fulmoj plurfoje trafis proksime al la kapelo, tiel, ke la muroj tremis kaj la sep viroj fermis la okulojn, timante esti nun trafataj. - Estas kurioze, ke eĉ la plaĵ kuraĝaj viroj hontas en tia situacio. -

Ĉiuj spuroj de la festarieco estis malaperintaj. Sufoka aero grave pezegis sur ili en la eta kapelo. Timige reflektiĝis fulmoj zigzagante laŭlonge de la mekulhavaj muroj. Kvankam nek altaro nek bildoj ĉeestis, la karaktero de la loko eble favoradis, ke la viroj silente unu post la alia krucoŝignis sin kaj komencis peti pri la vivo. La angoro iĝis neĝtenebla. Subite iu ekkriis: "Certe estas unu inter ni, kiu serĉas la fulmotondro, pekulo, kiu sekvas la puno. Nur tial la tondro ne finiĝas!" "Jes!" murmuris la aliaj ĝojante, ke kaŭzo videbliĝis, "unu inter ni!" Tiam embarasite ili silentiĝis. Kiu estis la kulpulo? Hontigite ĉiu ekzamenis sin, sed neniu sin sentis kulpa por fordoni sin al la kolero de la ceteraj. Finfine iu trovis la solvon: Dia juĝo! Ni puŝu niajn bastonojn ekstere en la trempigitan grundon. Kies bastono post la sekvanta trafo falos, tiu estis la pekulo. Tiel fariĝis. Ree interne ili kunpremris konvulsie la manojn kaj silente atendis. Jen la trafo! laŭtmuĝante kaj proksime! Ekscitite ili rapidegis ekstere. Unu el la bastonoj estis renversiĝinta. Ĝi apartenis al Lindpichler. Levinte ĝin, li volis reiri; sed la aliaj, kiuj jam estis revenintaj en la kapelo, tenis fermita la pordon.

"Ne!" ili kriegis. "Foriru! Vi estas la kulpulo. Kiu scias, kion malĝustan vi faris! Pro vi la fulmo persekutis nin. Iru! Vi ne rajtas eniri!"

Ree kaj ree li frapegis sur la pordo. "Ho kompatu! Mi ja ne estas pli kulpa ol vi!" Ili tamen konvinkiĝis, ke juĝo elstarigis ilin super la pekulo. De ilia absoluta "Ne", ĉiuj petegaj reĵetiĝis. Jen brilega fulmo zigzagis en la teron apud la kapelo. Lindpichler resaltis pro hororo. Li rekomendis sian animon al Dio kaj, nun jam tute malseka, rapidis hejmen tra la kampoj, sen konsidero al tio, kio povas trafi lin.

Momente post kiam la forpelito estis atinginta sian farmdometon, sekvis tenuraj fulmtrafoj kiel bombeksplodoj, sed malsupre en la valo jam ne estis tiel terure. Nur antaŭ la frua mateno la ŝtormo malfortiĝis.

Ĉar la ses postrestintoj jam ne estis hejme en la sekvanta mateno, la tuta vilaĝanaro forkuris per serĉi ilin. Inter la ruinoj de la kapelo ili estis trovataj, bruligitaj kaj preskaŭ nerekoncible, trafitaj de la fulmo. Dio faris alian juĝon. Vidu! Ĉi tiun lignan krucon ni starigis apud la kapelo memore al ili. Kaj la kapelo ne estas rekonstruita per montri, ke neniu rajtas opinii sin justa kaj forpuŝi sian fraton en la mallumon".

"Kaj kion travivis Lindpichler?" mi volis scii.

"Pri detaloj de la okazaĵoj li nur pene rakontis. Preskaŭ ne plu li diris vorton kaj mortis dum la milito".

Laŭ G.H. Mohr el "vojo de frato Jordano"  
tradukis el la germana Hugo Westhoff

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

AMUZA ANGULO  
=====

En la subtegmentejo de la pastrodomo de hispana vilaĝo, la mastrumantino malkovras krucifikson polvoplenan, sed tre belan. Pensante, ke ĝi eble multon valoras, ŝi montras ĝin al la pastro, kiu senĉas ĝin al ekspertizisto en Seville. Post unu monato venas la respondo de la fakulo: "Tiu krucifikso ege valoras, ĉar ĝi datumas de 300 antaŭ J. Kristo".

- 6 -

INTER SI DIVIDIS ILI

"Dungita soldato, ĵetku!" cin favoris!

- Senkudran tunikon taŭgis ne partigi.

- Ciaj tri kunuloj cin tamen ĵaluzis:

Ĝin eme por si mem deziris ekhavi.

- Di! tion decidis! Ne, mi diru: Sorto!

- Sorto, ne! Dio ja cin volis kostumi

Per sangaj ĉi larmoj, primiciaj al morto,

De filo verŝitaj antaŭ ol suferi.

JEN L' HOMO, ĉi supre! ĉi matene Pilat'

Al vi Lin forlasis; nun senvestigita,

Ridinde kronita, vundeŝvela, skarlata

Pro vipaskurĝado, draŝe disrompita...

Vi kruce mortigis senkulpan viktimon.

Vestaĉon forĵetu..., vestu la Tunikon.

J-P. A.

en Solesmes, S-tan Vendredon 1/4/1994

\*\*\*\*\*

KION FARI POR SAVI NIAN TERON ?

I. DOMA ENERGIO

1. Bone izolu vian domon: duoblaj fenestroj, ŝtopado.
2. Fermu la neuzitajn ĉambrojn, kaj ne hejtu ilin.
3. Surmetu pli varmajn vestojn kaj malpli hejtu. Havu termostaton por malpli hejti nokte kaj dum foresto.
4. Metu ŝutrojn kaj kurtegojn ĉe la fenestroj.
5. Plantu arbojn kun nedaŭraj folioj por protekti la okcidentajn fenestrojn kontraŭ la suno somere kaj enlasi la sunon vintre.
6. Por malvarmigi la domon, malfermu la fenestrojn nokte, fermu ilin tage.
7. Laŭeble, uzu malvarman anstataŭ varman akvon.
8. La temperatura de la akvo en la akvovarmigilo ne superu 49 °C.
9. Uzu la elektron kaj la varman akvon ŝpareme.
10. Estingu lampojn kaj TV, kiam vi ne plu bezonas.
11. Uzu pli efikajn lampojn, ekz. Fluoreskajn.
12. Elektu la plej efikan elektran aparaton.
13. Reguligu la termostaton de la fridujo je 3° C, de la frostujo je - 15°C.
14. Anstataŭ gladi, pendigu viajn vestojn en la banĉambro dum vi vin duŝas.
15. Kiam vi foriras por libertempi, estingu la hejtadon, la akvovarmigilon kaj la ŝparflameton de la gasaparatoj.
16. Laŭeble, aĉetu surloke, por ŝpari la transporton.
17. Praktiku sportojn kaj libertempajn aktivecojn, kiuj uzas la muskolojn anstataŭ benzinon aŭ elektron.

II. TRANSPORTOJ

1. Uzu la plej efikajn laŭ viaj bezonoj. Jen la listo ekde la plej efika kaj malplej polucia: biciklo, piedoj, ŝipo, trajno, aŭtobuso, aŭto, aviadilo, helikoptero.
2. Se via veturilo konsumas 1 l da benzino por malpli ol 8 km, vendu

ĝin kaj aĉetu pli efikan.

3. Tenu vian veturilon en bona stato.

4. Skribu al la fabrikistoj, ke vi deziras aĉeti la veturilon, kiu plej sparas la brulaĵon.

5. Ne uzu klimatizilon en la veturilo.

6. Dividu vian veturilon kun kolegoj.

7. Formetu la balaston el via veturilo: pliaj 50 kg forprenas 1% el la rendimento.

8. Ne veturu tro rapide; akcelu kaj malakcelu milde.

9. Instigu la lokajn estrojn je limigo de la aŭtomobiloj en la urbocentro.

\*\*\*\*\*

KOTIZTABELO 1996

I.K.U.E. kun "Espero Katolika" 140 F

Peranto: S-ro M. COLLEU p.ĉ.k. LILLE 10 621 81 P.

-----

|                                                        |       |
|--------------------------------------------------------|-------|
| A.F.C.E. kun "Franca Katolika Esperantista" - unuopulo | 40 F  |
| geedza paro                                            | 50 F  |
| infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o              | 20 F  |
| bonfaranto                                             | 200 F |

U.F.E. kun "Revue Française" kaj "E° Actualités" 280 F

U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro 300 F

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

\*\*\*\*\*

ENHAVO

- |                                   |                                |
|-----------------------------------|--------------------------------|
| 1. La mot du président            | 4. La Dia juĝo                 |
| 2. La bileto de la prezidanto     | 5. Inter si dividis ili        |
| Protokolo de la kunvenoj en Paris | Kion fari por savi nian Teron? |
| 3. Preĝo                          | 6. Kotiztabelo                 |

\*\*\*\*\*

Dépôt légal: 2è trimestre 1996!! Polycopié par l' A.C.F.E. (enregistrée le 6 mai

!! 1977 à la sous-préfecture de Saumur sous le n°

C.P.P.A.P. n° 62 532. !! 2 523 bis, J.O. 23/05/1977)

Directeur: Albert BESSIERE !! au Prieuré St-Martin

Directeur-délégué: !! 77610 LA HOUSSAYE EN-BRIE

René-Jean MARMOU !! FRANCE

\*\*\*\*\*